

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
januaro-marto 2009

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Jarfine

/Jarkomence

“Kulturo formiĝas diverse tra tempo kaj spaco. La diverseco konkretiĝas je la unikeco kaj plureco de la identecoj de la grupoj kaj socioj kiuj konsistigas la homaron. Kiel fonto de interŝanĝo, novenkonduko, kaj kreemo, kultura diverseco estas tiom necesa por la homaro kiom biodiverseco estas por la naturo. Tiusence, ĝi estas komuna heredaĵo de la homaro, kaj oni devas rekoni kaj afirmi ĝin helpe al nunaj kaj estontecaj generacioj.”

(Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, artikolo 1—Unesko)

Kiam koncepto esprimiĝas kadre de deklaracio farita de vicorganizo de Unuiĝintaj Nacioj, oni rajtas kredi ke ĝi pritraktas daŭran econ de la vivo. La jena citaĵo klare ekzempligas tion: kultura diverseco ne estas bunta ludilo per kiu ni dumtempe amuzas nin (kvankam ĝi enhavas diversajn amuzilojn) nek estas maniero per kiu oni povas fanfaroni la propran kulturon dum iu interkultureca okazo (kvankam ĝi respektas multajn kulturajn esprimojn). Male, kultura diverseco estas afero kiu meritas daŭran studadon, daŭran subtenlaboron, kaj daŭran efektivigon. Jaron post jaro, la subtenantoj de kultura diverseco devas prezenti siajn ideojn al la diversaj eroj de la homaro, multaj el kiuj apenaŭ komprenas la temon aŭ interesiĝas pri ĝi, aŭ eĉ ĝin kontraŭas pro diversaj kialoj. La laboro daŭris dum 2008 kaj daŭros dum 2009 kaj plu. Jarkomence, jadume, jarfine, la bezono kaj la defio restas konstantaj; pro tio gravas ĉiuj organizoj registaraj kaj neregistaraj kiuj laboradas por ke la koncepto kaj la realo de kultura diverseco kresku. PIP estu vigla en tiu laboro!

Edukado Interkultura kaj Dulingva

La renaskiĝo socia-kultura kaj politika de la indiĝenoj en Ameriko jam devigis ke la registaroj adoptu novajn politikojn pri la uzado de la originalaj lingvoj en lernejoj kaj la informada kampo.

Jen la temo de la oka Latinamerika Kongreso pri Edukado Interkultura kaj Dulingva,

kiu okazis en decembro 2008. La kongreso petis ke registaroj provizu bazan edukon interkulturan kaj dulingvan en la publikaj lernejoj de la indiĝenaj komunumoj.

La temo estas forte ligita al la principoj de la monda Esperanto movado. Pro tio, la prezidanto kaj la sekretario de la Argentina Esperanto-Ligo ĉeestis, kaj okazis la prezentado de raporto pri Esperanto.

(Informis Argentina Esperanto-Ligo)

Tiu kiu havas informojn pri la kongreso, bonvole kontaktu la redaktoron!

(Notendas ke multaj indiĝenaj popoloj tiom forte koncentras sin je la revivigo de siaj lingvoj ke ili ne priatentas Esperanton—nek planas priatenti ĝin. Ni kiuj vidas la rilaton inter Esperanto kaj la oftaj komunaj problemoj de indiĝenaj popoloj ne lasu ke la nune taŭga koncentriĝo de indiĝenaj popoloj pri siaj propraj, urĝaj problemoj malkuraĝigu nin pri la eble grava estonta rolo de Esperanto inter tiuj popoloj.)

Heroino de Indiĝena Kolombio kaj de la Homaro

La Instituto Linguapax premiis la kolombian kulturan heroinon Natividad Mutumbajoy, indiĝeno de la inga gento.

S-ino Mutumbajoy laboris dum pli ol 30 jaroj por revivigi la lingvon de sia gento kaj starigi plurlingvan edukadon en la lernejoj kiuj servas sian genton, inter ili lernejo kiun ŝi starigis en forega komunumo.

S-ino Mutumbajoy kunlaboris kun la neregistara organizo Amazon Conservation Team (Amazona Konservado-Teamo) por okazigi studadon de la inga, direktas regionan radio-programon en la inga realigitan de anoj de la indiĝena komunumo, kaj subtenas la konservadon de la tradicia medicino de la regiono.

Dum jardekoj de perforto ka malriĉeco en Kolombia vivo, Natividad Mutumbajoy subtenis, kunlaboris, organizis, direktis, instruis, kaj lernis. Ŝia laborego estis kaj estas fruktodona.

(Informo-fonto: Oralidad 2006 [Unesko])

Kiuj Estas la Farantoj de La Kalumeto?

Kiam mi preparas numeron de La Kalumeto, venas al mi ĉi tiaj demandoj:

---Kiun interesan novaĵon mi ne inkludas, ĉar mi scias nenion pri ĝi?

---Kiun notindulon pri lingvaj aferoj mi preteratentis pro nescio pri li aŭ ŝi?

---Kiun netuŝeblan kulturaĵon (kanton, rakonton, kutimon. kaj tiel plu) mi ne priatentigis pro tio ke mi neniam aŭdis pri ĝi?

Unu el la plej gravaj limigoj je mia raportado estas tio ke, krom Esperanto, mi scipovas nur la anglan kaj la hispanan. Tio kompreneble signifas ke kiam mi fiŝkaptas en la maro de informoj nun haveblaj al retumantoj kaj legantoj, mia boato estas malgranda kaj mia fiŝreto estas truegohava.

Tiun rakonteton mi prezentas por atentigi ke vi, la legantoj de La Kalumeto, estas uzantoj de pluraj lingvoj kaj ke vi loĝas en pluraj landoj. Mi petas ke vi sendu al mi informojn kaj novaĵojn pri aferoj en viaj landoj kiuj rilatas al la temoj de PIP, por ke tiuj informoj pliriĉigu la sciaron kaj agadaron de PIP-anoj kaj Esperantistoj ĝenerale. Simile, ne preteratentu tradukojn kaj priskribojn de netuŝeblaj kulturaĵoj indiĝenaj kiuj aperas en lingvoj konataj de vi, aŭ kiujn vi konas persone. Mi petas ke vi trakuku ilin en Esperanton aŭ priskribu ilin en tiu lingvo kaj sendu ilin al PIP por ke ili aperu en La Kalumeto.

Do, kiuj estas la farontoj de La Kalumeto? Espereble, ĉiuj kiuj legas kaj legos ĝin!

Mallonge pri Nature Conservancy (Natur-Konservado)

En Venezuelo, Nature Conservancy estris kunsidon pri la konservado de sovaĝaj regionoj gravaj al indiĝenaj popoloj kaj ankaŭ gravaj por la bestaj kaj plantaj specioj tie trovataj. Nature Conservancy celas krei natur-konservajn partnerecojn kun indiĝenaj grupoj.

En la usona ŝtato Kentucky, la Landa Fakoj pri Parkoj kunlaboras kun Nature Conservancy pri la kreado de ekologiaj kaj kulturaj elmontraĵoj en natur-konservejoj kiuj enhavas indiĝenajn tumulojn kaj hieroglifojn lasitajn de la gento ĉerokia (anglalingve: Cherokee).

El “Manifesto de la Fondaĵo por Endanĝerigitaj Lingvoj” (Federation for Endangered Languages)

“Ekzistas akordo inter lingvistoj kiuj konsideris la situacio ke pli ol duono el la lingvoj de la mondo estas mortantaj, t. e. ke oni ne efike transdonas ilin al la sekvanta generacio. Do, ni kaj niaj infanoj vivas je la punkto en homa historio kiam, eble dum du generacioj, la plimulto da lingvoj formortos.

“Ĉi tiu amasa formorto de lingvoj eble ne ŝajnas vivominaca. Kelkaj personoj sentos ke malpliigo de la kvanto de lingvoj faciligos komunikadon, kaj eble subtenos la konstruadon de landa aŭ eĉ monda solidareco. Tamen, oni trafe atentigas ke la homa sukceso je sia loĝado ĉie sur la planedo okazis pro tio ke ni kapablas evoluigi kulturojn kiuj kapablas transvivi je diversaj medioj. Tiujn kulturojn oni sukcesis transdoni lingve—buŝtradicie kaj poste skribe. Pro tio, kiam lingva transdonado rompiĝas, precipe antaŭ la estiĝo de legpoveco fare de la koncernaj lingvanoj, ĉiam okazas granda perdo de heredita scio.

“Tiu scio perdiĝas, ĉu alte taksita ĉu ne, kaj la homaro malpliriĉiĝas. Kun la malapero de tiu scio povas malestiĝi granda ero el la fiero kaj mem-identeco de la komunumo de parolantoj de la lingvo.”

Komentoj pri La Manifesto de Prago

Punkto 7: Homa Emancipiĝo

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado, kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

Por klare komenti pri ĉi tiu punkto rilate al indiĝenaj kulturoj kaj lingvoj, mi citas iom pli el la teksto de la sepa punkto de la manifesto: Esperanto estas... projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Kiam mi pensas kaj min esprimas pri indiĝenaj aferoj, mi faras tion kiel eksterulo. Mi ne estas indiĝeno, sed kelkfoje mi havas fortan senton (kiu ne havas tian senton?) ke mi ne vere anas en la grupo en kiu mi min trovas. Eble tio povas esti komenco-punkto por kompreni la doloron kaj la riĉecon de indiĝeno kiu sin trovas inter kulturoj kaj lingvoj. En grandega, kormerca amaskulturo, se oni sentas sin iom ekster la vivo de la kulturo, oni povas serĉi "lokon" kie la vivo ŝajnas pli riĉa kaj nutra. (Kiom el ni esperantiĝis ĝuste pro tio?) Se oni estas indiĝeno en tiu situacio, oni havas "ĉe-sange" eblecon por trovi riĉecon kaj spiritan nutraĵon. Se ni serĉas indikilon de la graveco de tiu punkto, ni nur devas rigardi la situaciojn de indiĝenoj, urbaj aŭ ne, kiuj strebas por rekapti siajn lingvojn, aŭdaj kaj konceptaj "lokoj" kie ili povas nutri sin kaj nutri aliajn samlingvanojn.

Por indiĝeno kies lingvo ankoraŭ plene vivas, kiu estas la "loka" lingvo pri kiu parolas la manifesto? Kiaj estas la "radikoj"? (Kaj por esperantistoj, kio signifas "loka" kiam la mondo de Esperanto iusence atendas nin ĉe la Interreto?)

Plurlingva kaj plurkultura persono certe havas pli komplikan vivon. Li aŭ ŝi eble sentas sin hejme en pli da lingvaj kaj kulturaj "lokoj" aŭ situacioj. Tamen, li aŭ ŝi ankaŭ devas lerni kie tiuj "lokoj" havas siajn limo-problemojn". Ne ĉiu lingvo bonvenas en ĉiu situacio. Ne ĉiu mondopercepto bonvenas en ĉiu preĝejo. Ne ĉiu koncepto de teren-posedado bonvenas en ĉiu ekonomia sistemo. Plurlingveco povas okazigi diversspecajn silentojn. Plurkultureco povas okazigi pli da hezitado kaj neagemo, eĉ fuĝado.

Ĉu Esperanto kondukas al la emancipiĝo por iu ajn? Aŭ ĉu emancipiĝo unue okazas ene de homoj kaj poste esprimiĝas per kulturoj kaj lingvoj? Aŭ ĉu ambaŭ povas okazi, kaj ja okazas? Demando por pripensi, solvi, elvivi....

(Per ĉi tiu ero, la serio pri la Manifesto de Prago finiĝas.)

Notoj pri Prov-projekto pri Dulingva Edukado inter la Kam-gento en Gŭiĵaŭ-provinco*

Verkis D. Norman Geary, Fako de Gŭiĵaŭ-Universitato, Guĵjang, Guĵaŭ, Ĉinio kaj Jongrong Pan, Instituto por Esplorado pri la Gentoj de Gŭiĵaŭ, Gŭijang, Gŭiĵaŭ, Ĉinio.

Memuaro pri dulingva edukado kaj la integrado de edukado, lingvo(j), kaj kulturo el Revuo de Multlingva kaj Multkultura Disvolviĝo

Unua artikol-parto:

Mandaren-lingvan edukadon oni ĝenerale taksas en Ĉinio kiel pado al la forigo de senscio en minoritataj vilaĝoj. Kvankam oni opinias ke la forigo de senscio estas bona afero, la ofta rezulto de tiu eksigo estas ke multaj junuloj foriras la vilaĝojn kaj iliajn minoritatajn kulturojn, celante la urbon Gŭadong kaj pli altan vivnivelon. Pro tio, la problemo de la minoritataj gentoj, ĉi-okaze la kam-gento, estas trovi la

vivmanieron kiu ebligas kaj la tenadon de la pli valoraj aspektoj de la tradicia kulturo kaj la pli utilaj aspektoj de la moderna vivo. La uzado de du lingvoj, ĉi-okaze la gam-lingvo kaj la mandarena, povas kombini kun komunik-sistemo kiu ebligas larĝan komunikadon, ekzemple inter vilaĝoj kaj urboj.

La konstitucio de la Popola Respubliko de Ĉinio deklaras ke ĉiuj gentoj de Ĉinio estas egalrajtaj kaj ke ĉiuj etnaj minoritatoj rajtas uzi sian lingvon. Tamen, la verkintoj de la memuaro raportas pri maljunulo kun kiu ili parolis en Ĉinio; li informis al ili ke li havas “neniun kultur-nivelon” pro tio ke li ne parolas la ĉinan, kvankam li flue parolas la persan kaj la araban, loĝis eksterlande dum pluraj jaroj, kaj havas konsiderindan scion. Notinde en la ĉina politiko pri kulturo, lingvo estas la tendenco permesi kaj eĉ iom instigi la pluekziston de minoritataj kulturoj kaj lingvoj sed samtempe okazigi ĉe la minoritataj kulturoj sencon de malplivaloreco kaj instrui al junuloj ke kiam minoritatumulo “pliĉiniĝas,” li aŭ ŝi altigas sian kulturan pozicion.

(Daŭrigota)

Ranego-rakonto

Ĉe la elementa lernejo Iranoo en Viktoria-ŝtato, Aŭstralio, lernantoj uzis argil-manipulan animadon por fari filmon pri la konata raneg-rakonto de la aŭstralaj aborigenoj, Tiddalik. Tiu rakonto pritraktas temojn de senpluveco kaj inundo per la rolulo de rano kiu kredas sin tiom grava ke li rajtas fortrinki la akvon el ĉiuj riveroj kaj lagoj.

Oni verkis la tekston anglalingve; la genta Pliaĝulo David Tournier tradukis ĝin en la indiĝenan lingvon, vatarong.

Tra Aŭstralio oni uzos la filmon por kultura edukado.

Ĉielokantoj

Vidu la sunleviĝon

Vidu la sunleviĝon

Tute sankta ĉi tiu tereno

Spirito ĉe-manas

Ni kundividas la ĉielarkon

Kiam vi kaj mi vidas ĝin

Revenu poste

Transmara amiko

Verkis (s-ino) Vanessa Fisher, aŭstrala indiĝeno. Originala lingvo: duungidjavo.)

Ni estas la steloj kiuj kantas

Ni estas la steloj kiuj kantas,

Kiuj kantas sialume.

Ni estas la fajrobirdoj

Kiuj flugas tra la ĉielo.

Nia lumo estas voĉo,

Per nia kanto ni faras padon,

Padon por ke la spirito transiru.

(Antikva kanto de la pasamakvadi-gento [angle: Passamaquoddy] de nordorienta Usono.)

Nia patrino, nia patro

Nia patrino la Tero, nia Patro la Ĉielo,

Teksu por ni veston el brilo;

La varpo estu la blanka lumo matena,

La vefto estu la ruĝa lumo vespera,

la franĝoj estu la pluvo falanta,

la bordero estu la ĉielarko staranta;

Teksu por ni veston el brilo

Por ke ni paŝu laŭ la ĝusta vojo.

(El kanto de la teva-gento [angle: Teŭa] de sudokcidenta Usono)

La sepa direkto

Estiĝokomence, la Granda Mistero faris ĉiujn aĵojn. Tiam li metis la kvar direktojn en siaj ĝustaj lokoj: la sunleviĝa loko, la somera loko, la sunsubira loko, kaj la vintra loko. Tiam la Granda Mistero lokigis la Ĉielo-direktonn supren kaj la Tero-direkton malsupren por fini sian laboron....preskaŭ.

Kiam la ses direktoj jam havis siajn lokojn, restis al la Granda Mistero lokigi la sepan. La Granda Mistero multe maltrankviliĝis pri la situacio, ĉar la sepa direkto enhavas grandan scion pri la spirita vivo. La Granda Spirito sciis ke homoj sentos fortan altiron al tiu scio, kaj ke plene eblos ke homa misuzo de ĝi kaŭzos terurajn problemojn. Fine la Granda Mistero decidis kaŝi la sepan direkton en loko tre malfacile trovebla por la homoj.

Por trovi la ĝustan, zorgeme elektitan kaŝlokon, la Granda Mistero demandis pri tiu afero al la bestoj kiuj okupis diversajn vivolokojn. Aglo sugestis ke la Granda Spirito lokigu la sepan direkton en la ĉielo, ĉar la homoj ne kapablas flugi. Urso sugestis ke la Granda Spirito lokigu la sepan direkton en la tero, ĉar Urso sendanĝere ripozis en subtera loko, kaj opiniis ĝin bonega. Fiŝo sugestis ke la Granda Spirito loku la sepan direkton en la profundaĵoj de la maro, ĉar tiuj estas nekonataj al la homoj. La

Granda Spirito malakceptis tiun sugestojn; li sciis ke la homoj estis ege scivolemaj, kaj iam vojaĝos al ĉiuj mondopartoj.

Fine Talpo faris sugeston, kaj la Granda Spirito akceptis ĝin. Li lokigis la sepan direkton en la koro de ĉiu persono. Pro tio ke rigardi profunde en propran koron estas tre malfacila faro, nur la plej honestaj kaj kuraĝaj homoj trovas la sepan direkton, kaj la forton kiu estas tie.

(Rakonto de la lakota-gento [Usono])

Ĝusta aŭ malĝusta

Distancas kvin mejloj de la reservejo al la urbeto,

Malvarme, li rapide piediras,

Dorso arkigita, rigardo ĝisteran

Por ŝirmi sin kontraŭ la vintra ventego.

Vidata kontraŭ ĉielo pala

Nek nigra nek blanka

Parte aborigena viro

Ĝusta aŭ malĝusta.

Ĝusta aŭ malĝusta, kiu povas juĝi?

Ho reganta socio?

Miaopinie: inferen iru

Laŭ vojo de pureco blankfarbita.

(Verkis s-ro Jack Davis, indiĝena poeto aŭstrala)

Esperanto estas komunikilo, sed ĉi tiu bulteno okazigas tre malmulte da komunikado! Kio okazas? Au eble mi devas demandi, kio ne okazas? Bonvole komuniku viajn reagojn, viajn dezirojn.....

Ankaŭ mi petas ke vi pripensu la fakton ke je la 21 de februaro oni denove festas la Tagon de la Gepatra Lingvo. Sed kiel? Sendu sugestojn, kaj ni kunfaru valoran aldonon al tiu festotago—eble ĉijare, certe en 2010!

PIP--- ejfelker@dslextrême.com

Erik Felker / 414 E. Cedar Ave., Apt. 11 / Burbank, CA 91501 / U.S.A--Usono.